# Vizitu la SAT-Amikaran sidejon !

Ĝi ne estas nur librejo kaj sidejo de nia asocio ! Ĝi ankaŭ estas loko, kie povas renkontiĝi ne nur esperantistaj Parizanoj, sed ankaŭ diversdevenaj vizitantoj por lerni Esperanton, aŭ por diskuti per Esperanto pri diversaj interesaj temoj, aŭ simple por renkonti unu la aliajn en alloga etoso...

Iom post iom, la SAT-Amikara sidejo riĉiĝas per kulture valoraj objektoj donacitaj de homoj, kiuj diversmaniere tiel agadas, aŭ dankas SAT-Amikaron, aŭ deziras plibeligi la lokon, kie oni deziras plu daŭre agadi.

Unu el la plej novaj donacoj, videblaj en la sidejo, estas tiu de Caroline Mauboussin : belega vitrala artaĵo, kiun ŝi mem verkis uzante teknikon, kiun ŝi lernis, kiam ŝi emeritiĝis, tiel konfirme montrante, ke oni povas esti juna en ĉiuj aĝoj, lernante kaj kreante en fakoj, kiujn oni  antaŭe ankoraŭ ne malkovris...

